



---

## Novjara mesaĝo al la AIS-anoj, decembro 2016

Estimataj membroj kaj kunlaborantoj de AIS,

Tio ĉi estas la unua mesaĝo kiun AIS disigas inter siaj membroj uzante la novan retan adresaron. Dum septembro kaj oktobro AIS sendis (lastfoje per papera poŝto) personan leteron al pli ol 700 membroj en la malnova AIS-adresaro, kun la peto ĝisdatigi pri la aktualaj retadreso, kun la celo modernigi nian informsystemon kaj intensigi la kontakton kun la membroj. Tiu kampanjo, farita kunlabore kun la kolegoj Fössmeier kaj Corsetti, reduktis la pli ol 700 poŝtaj adresoj, plejparte ne plu aktualaj, al 66 efektivaj membroj kaj kunlaboremuloj, kun la realaj retadreso.

Dum mia unua jaro kiel prezidanto de AIS, aldone al la membrokampanjo mi iniciatis plurajn aktivecojn cele al modernigo kaj vigligo de la scienca agado de AIS, ĝian kontakton kun aliaj E-organizoj. La ĉefaj aktivecoj estis informado pri AIS en la E-medio, revivigo de la Premio Pirlot, intensa agado de AIS dum la UK en Nitra (inkluzive de senatkunsido), kunlaboro kun aliaj E-organizaĵoj, plej notinde UEA kaj ISAE. Plena kaj pli detala listo troviĝas en mia septembra cirkulero kiu aperas ankaŭ en la AIS-retejo <http://ais-sanmarino.org/>.

El la nuna cirkulero mi volas redividi kun vi la rekomendojn pri la estonta agado de AIS, faritaj dum la senatkunsido en Nitra, por kontroli kiomgrade ili estis plenumitaj.

1. Pli proksime kunlabori kun UEA, ISAE kaj aliaj sciencaj E-instancoj.  
– daŭras la kunlaboro kun UEA. Aperis alvokoj por la AIS-IKU sesio en Seulo, rete (ekzemple kiel Gazetara Komunikado n-60, aperinta la 22.11 kaj en alvoko de la UEA-estraro pasintsemajne) kaj en la novembra n-ro de revuo Esperanto (aperonta en januaro). Kun ISAE daŭris la kontaktoj, i.a. mi elektiĝis kiel observanto de AIS en la nova estraro de ISAE.
2. Profesie renovigi kaj modernigi la AIS-retejon.  
– Tiu projekto bedaŭrinde ankoraŭ ne progresis, ĉar la fakulo kiu promesis okupiĝi pri la renovigo, Dima Ŝevĉenko, ankoraŭ ne trovis la tempon komenci la laboron.
3. Krei funkciantan retliston por komuniki kun la membroj.  
– Farita, kiel mi raportis komence de ĉi tiu cirkulero
4. Revizii la AIS-statuton cele al plisimpligo de akcepto de novaj membroj.  
– Mi komencis lerni la malnovan statuton kaj la administran strukturon de AIS, kaj trovis ke ĝi estas tre kompleksa, plurloke ankaŭ arkaika aŭ obskura. Mi havas multajn konkretajn planojn, kiel plisimpligi kaj modernigi ĝin, kiel mi reviziis la regularon de Premio Pirlot, sed nature tio estas multe pli granda projekto kiu devas esti farita konsulte kun la senato kaj bezonos multe pli da tempo.
5. Redukto de la elspezoj – i.a. per ĉesigo de la AIS-a papera revuo GrKG/H (kiu ev-e plu aperos rete), transiro al malpli kostaj banko-konto kaj retprovizanto.  
– Tiuj paŝoj okazas ĝuste nun. Granda ŝparo jam okazis per la sendado de tiu ĉi cirkulero rete, anstataŭ poŝte kiel en la antaŭaj jaroj. Ĝi ŝparis pli ol mil eŭrojn da afranko kaj printo de paperaj cirkuleroj por 700 adresoj.
6. Krei grupon de kunlaborantoj, kvalifikitaj personoj (la "AIS-konsilio").  
– Tiu grupo nuntempe konsistas el la senato kaj kelkaj aktivaj kunlaborantoj, kaj ĝi kreskos per invito de pliaj kunlaborantoj aŭ aliĝo de kiu ajn el la membroj kiuj volas pli aktive aŭ specife kontribui. Se vi tion deziras, bv. skribi al informo ĉe [ais-sanmarino.org](http://ais-sanmarino.org).

Specifaj projektoj por la proksimaj monatoj – kadre de la 10-a sesio de la Internacia Vintra Universitato kiu okazas ĉi jare dum la Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken, Germanio, okazos 5 AIS-kursoj. Por la AIS-IKU en Seulo venis jam 3 proponoj por AIS-IKU kursoj. Se vi planas iri al Seulo kaj volas proponi IKU-prelegon aŭ AIS-IKU kurson, bv. sendi resumon al la IKU-sekretario, kiu hazarde estas mi, ĝis la 31.1.2017. AIS ricevis inviton por SUS en Vroclavo, kaj la senato baldaŭ traktos por formaligi kaj provi efektiviĝi ĝin.

Ekde kelkaj jaroj AIS ne kolektis la simbolan kotizon da 6,50 eŭro jare, nur la subtenajn kontribuojn de 65 eŭroj. AIS tamen urĝe bzonas financajn rimedojn por plulabori. Ĉiuj AISanoj estas anstataŭe petitaj fari libervolan kontribuon. Tiuj kontribuoj estos kreditataj al la persona servobonhavo kaj povos esti uzataj por pagi AIS-rilatajn aktivadojn agnoskitajn de la senato. Ekde 2016 AIS denove havas la rajton doni donackvitancojn laŭ la germana impostleĝo. Donacinto kiu deziras kvitancon, bv. sendi sian impost-adreson al ([trezoristo@ais-sanmarino.org](mailto:trezoristo@ais-sanmarino.org)). Eblas pagi ankaŭ per la Paypal-konto de AIS, per kreditkartoj simple alkakante la butonojn sur la hejmpaĝo ([ais-sanmarino.org](http://ais-sanmarino.org)).

Mi ŝatus fini tiun novjaran cirkuleron per persona rakonto, kiun mi travivis antaŭ du semajnoj en konferenco pri astrobiologio en Vjetnamio. La konferencon partoprenis pluraj docentoj kaj studentoj de la universitato de Vieno. Mi demandis ilin, ĉu ili hazarde konas la kolegon Maitzen, kaj evidentiĝis ke ĉiuj bone konas lin, unu eĉ studis kurson ĉe li, kaj plej interese – ili aŭdis pri Esperanto dank' al li. Ĉe la manĝotablo, aliaj partoprenantoj de la konferenco aŭdis nin diskuti pri Esperanto. Ĉeestis membroj de la instituto de Astrobiologio en Madrido, kie laboris mia kolego kaj kunaŭtoro de la libro "La Kosmo kaj Ni", d-ro David Galadi. Ili bone konis lin, kaj eĉ aŭdis pri tiu libro. Eĉ pli mirinde, unu el ili estis iama membro de Esperanto-grupo kaj alparolis min en Esperanto! Ni iom babilis kaj mi rakontis ke antaŭ unu jaro aperis en la revuo Kontakto longa artikolo mia pri astrobiologio. Li petis ke mi sendu ĝin, kaj leginte li tiom entuziasmiĝis, ke li metis ĝin en la retejon de Hispanaj astrobiologoj: <http://www.icog.es/redespa/index.php/sabias-tambien-se-ha-escrito-astrobiologia-esperanto/>.

Havu feliĉan novan jaron kaj ni esperu pri realigo de niaj planoj helpe de via kunlaboro kaj subteno.

Amike, Amri